



La Espero

Universalan Kongreson de Esperanto en Havano, Kubo, partoprenis pli ol mil esperantistoj

Legu sur paĝo 3.

Movada foiro grava por prezentiĝo antaŭ la venontjara Universala Kongreso en Kopenhago, Danlando.



La inaŭguro de la kongreso. Fotis: Sven Linnér.



Kontaktoj inter svedaj kaj kubaj esperantistoj: De maldekstre: Sven Linnér, filo de R., Tomas Jansson, filo de R. Rafael Cabrera Espinoza, Åke Waller. Legu pri komputila donaco sur p. 5.

Dum la interkona vespero de la UK en Havano estis ebleco prezenti sian organizon en la Movada Foiro. Ĉi-jare sesdeko da landaj asocioj, fakaj asocioj kaj aliaj kaptis tiun eblecon. Por ni svedoj la venontjara UK en Kopenhago donas eblecojn por eksterlandaj vizitoj. Sekve mi prezentis la ekziston de

esperanto-klubo en Svedio, ĉefe tiun de Malmö. Pere de la ponto nuntempe eblas vojaĝi en nur duona horo inter Kopenhago kaj Malmö. Espereble nia prezento de la sveda movado kontribuos al pli da vizitoj de esperantistoj kunlige kun la venontjara universala kongreso en Kopenhago.

Sten Svenonius

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Septembro 2010 • 98-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2010: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2010:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs-exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,

754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: esperanto@globalnet.net

Stoppdatum *Utkommer senast*

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5-6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Beatrix Stridh



Kie vi naskiĝis?

En Hungario, en Budapeŝto. Tie mi loĝis dum ok kaj duona jaroj. Poste en aliaj lokoj.

Kie vi loĝas?

En Borlänge. Antaŭe en Malmö dum 20 jaroj.

Pri kio vi laboras?

Ĝuste nun mi estas senlabora. Espereble mi ricevos laboron en la virina deĵoro aŭ fondos propran kompanion.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

La familio, la katoj, bicikli, iri en la naturo. Mi laboras idealisme por la virina deĵoro.

Ĉu vi havas familion?

Jes, kaj multaj parolas Esperanton.

De kiam vi interesigas pri Esperanto?

Kiam mia gepatroj eksgeedziĝis, ni translokiĝis al alia urbo. Tie ni konis neniun. Mia patrino iris al la kultura domo por partopreni iun ajn kurson por konatiĝi kun homoj. Iu viro staris tie kaj diris ke baldaŭ komenciĝos Esperanto-kurso. Ŝi ekstudis. Poste ŝi hejme instruis al mi kaj aliaj knabinoj.

Ĉu vi havas aŭ havis iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Ne.

Ĉu vi havas iun favoritan libron?

Mi legis La Faraonon kiam mi estis infano. Mi ŝatas ankaŭ la bildstrian libron Genetiko. Mi legas ion ajn.

Ĉu ekzistas aliaj interesajoj pri vi?

Miaj patrino, fratino, nova patro, edzo de mia fratino, unu el la filoj de mia fratino, la patro de miaj gefiloj, miaj filinoj, mia filo, mia nova edzo, liaj du filinoj – ĉiuj parolas Esperanton.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

VORTOJ DE LA REDAKTORO

En tiu ĉi numero de La Espero Sveda Esperanto-Federacio invitas al renkontiĝo en Norrköping.

Eble estas tempo reorganizi la svedan Esperanto-movadon. Kial? La tradiciaj popolmovadoj perdas membrojn. Samtempe interreto allogas ĉiam pli da uzantoj.

Tio ĉi validas ne nur por aliaj movadoj, sed ankaŭ por la Esperanto-movado.

Esperanto bone vivas kaj progresas en interreto. En ĉiu numero de la Espero ni raportas

pri interretaj agadoj en Esperanto.

Esperanto fakte estas lingvo, kiu estas tre uzebla en interreto. La uzantoj de nia lingvo loĝas dise tra la mondo. Sendkostoj por libroj k.t.p. estas grandaj. Distancoj ne estas granda problemo en interreto.

Ĉu La Espero en la estonteco estos interreta revuo? Aŭ ĉu papera revuo sed kun pli bunta enhavo ol nun. Kion vi opinias? Venu al Norrköping kaj diru vian opinion.

Via redaktoro

Pli ol milo partoprenis Esperanto- kongreson en Havano, Kubo

Iom pli ol mil esperantistoj partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Kubo 17-24 julio. Inter ili estis ankaŭ sep svedoj. La Espero raportas uzante noticojn el la kongresa kuriero Havana Karavano.

Afrikdevena religio kuba "santeria"

Salonon Hodler plenigis sesdeko da scivolantaj gekongresanoj kiuj ricevis detalajn sciigojn pri Yoruba, santerio, muziko, lingvo, historiaj faktoj kaj aliaj konsistigaj partoj de la kuba kulturo. Prelegis s-ino Mayra Nunez, kiu rave sukcesis bildigi la afrikdevenan religian kulton per sia ĉarma parolo kaj sia maniero efektive klarigi faktojn per rekta montrado de la kulto. Interalie s-ino Nunez' reliefigis kaj elmontris la dancojn, muzikilojn, salutojn kaj signifojn de la diaj estaĵoj. Post finiĝo de la praktika prelego la partoprenantoj aktive starigis aliajn demandojn, kiujn la prelegintino saĝe, brile kaj profesinivele respondis. Resume la partoprenantoj havis la ŝancon gustumi la fruktojn portitajn de s-ino Nunez por bildigi eron de sia brila prelego. Kanto kaj danco fare de tri montrantoj dancigis kaj kantigis la partoprenantaron, per kio oni fermis prelegon brilan kaj interesvekan.

Alexis Otero

Junularo ekskursis HEJMEN

Kadre de la Junulara Programo spontane organiziĝis merkreda ekskurso HEJMEN: la Havana Esperanto-Junularo Malmultekosta Ekskurso Neoficiala. Antaŭ la hotelo Neptuno-Triton kunvenis matene 29 gejunuloj kaj

per la loka transporto ekveturis al la centro de la malnova urbo. Tie oni dum la tago vizitis multajn vidindaĵojn (inkluzive de Zamenhof-tabelo), bone maĝis en restoracion kaj en la fama glaciaĵejo Coppelia, trovis geokaŝujon (sekreta trezoro de tutmonda ludo) kaj fotiĝis kun la lumturo – la simbolo de la kongreso. Fine oni revenis ja hejmen, ĉiu al sia hotelo.

Marek Blahuš



Centjariĝo de Esperanto en Kubo

La preleganto Juan Ramon Rodriguez klarigis ĉion rilate al la centjariĝo de Esperanto en Kubo kaj la poresperanta agado en Kubo antaŭ la oficiala fondiĝo de KEA. Li montris multajn dokumentojn originalajn, kiuj pruvas la ekziston de revuoj, kaj aliajn, kiuj celis la disvastigon de Esperanto nialande. Elstariĝis reprodukto de portreto de Zamenhof farita de juna kuba pentristo de la frua epoko.

Pedro Fernandez

Teatraĵo Almanza

Sub la titolo *Esperanto por ĉiam* la renoma kuba aktorino Georgina Almanza per kantoj, verva deklamado de klasikaj poemoj (i.a. La vojo), kaj rakontado de absurdaj anek-dotoj prilumis por la ĉ. 80-kapa aŭskultantaro la esencon de la vivo mem. La publiko arde aprezis la profesion prezentadon.

Tomas Jansson

Ekumena Diservo

Malgraŭ malfacilaĵoj pro lastmomenta ŝanĝo de la loko, la Ekumena Diservo de la UK sukcese okazis dum dimanĉo ekde 15h00, celebrata de pastro Peter Knauer en la preĝejo Jesus de Miramar kun ĉeesto de kvardeko da kongresanoj. Anoj de pluraj religioj unuiĝis en preĝo kaj kantado kaj aŭskultis originalan esperantlingvan homilion pri la evangelia Legajo.

Marek Blahuš

Nacia vespero

La spektantoj ĝuis agrablan kaj interesan Nacian Vesperon. Kritikpunktoj estas malmultaj. Temis pri plej diversaj muzikprezentoj, sed eblas diri ke mankis prezentado de kuba kulturo. Oni povus pensi pri recitado de poemoj, literaturo kaj eble prezento de kubaj dancoj. Tre plaĉis grupo de junuloj kiuj dancis kaj faris ritmajn sonojn nur per la korpo kaj manoj. Ankaŭ tre bona prezento estis la fina, en kiu kantistino plej bele kantis.

Martin Schaffer

Vizitu la retan kinejon

Multaj programeroj de la 95-a Universal Kongreso en Havano estis filmitaj kaj la registraĵoj aperos iom post iom en la Reta Kinejo de UEA. La laboro estas farata volontule kaj etendiĝos verŝajne tra du-tri monatoj. Kiel la unuajn la filmisto Francisco L. Veuthey finpretigis la programerojn

Vizitu la retan Kinejon de UEA: www.ipernity.com/doc/97850/home/video

Kom till Norrköping i oktober

Stormöte om framtiden för
esperantorörelsen i Sverige.

Kan den organiserade
esperantorörelsen möta den
moderna framtiden?

Det har redan gått ut information på annat sätt till flertalet esperantister och medlemmar i Sverige. Utvecklingen för den organiserade esperantorörelsen är alarmerande. Omvärlden har kraftigt förändrats medan våra organisationer inte riktigt hängt med i utvecklingen. Vi behöver arbeta gränsöverskridande. SEF inbjuder därför till en organisationsöverskridande storträff för att diskutera möjliga åtgärder och skissa på en aktiv handlingsplan för att möta utmaningen. Diskutera med dina vänner om hur du vill att framtiden ska se ut! Det finns också möjlighet att diskutera detta på nätet via Ipernity. Se vidare på

www.ipernity.com/group/102459/discuss/
Det finns en del tankar bland medlemmarna, allt från att endast anpassa stadgarna, eller att arbeta i projekt för specifika ändamål utan övergripande organisation, eller att ha en minimalistisk administration eller till att omorganisera hela rörelsen så att allt finns under ett tak med olika sektioner för olika intresseinriktningar. Vad tycker du? Vad vill du med ditt engagemang för Esperanto?

Kom till Norrköping den 9-10 oktober.

Plats: NBV:s lokaler ligger på
Repslagaregatan 9-11

Tid: lördag 9 okt kl 10:00 till söndag 10 okt
ca kl 16:00

Informera gärna ditt deltagande till Bengt Olof
Åradsson sef_boarad@yahoo.se eller Ann-Louise
Åkerlund al_akerlund@yahoo.se.

Logitips:

* Centric Hotel, Gamla Rådstugugatan 18-20, tel
011-129030

hemsida www.centrichotel.se. Enkelrum för 550:-
/natt och tvåbäddsrum för 650:- Det finns också 3-
och 4-bäddsrum.

* Vandrarhemmet Above, som ligger i
Centralstationen, Norra Promenaden 94, tel 011-
101828 hemsida www.above-vandrarhem.se.
Enkelrum för 325:-/natt, dubbelrum 425:-. Det finns
också 3- och 4-bäddsrum & sovsal.

* STF:s vandrarhem Turistgården, Ingelstagatan 31,
tel 011-101160 hemsida www.turistgarden.se, tar
350:-/natt för enkelrum, 520:- för tvåbäddsrum. De
har också 3- och 4-bäddsrum samt flerbäddsrum.

**Var ute i god tid – vi har inte reserverat
några logiplatser**

DEBATT

Kommunikation och tidning

Vilka är då dessa radikala ideer som skulle vända allt till det bättre? Det handlar om två saker, men att dessa förändringar med säkerhet skulle förändra utvecklingen till något succéartat, om detta kan inte heller jag vara tvärsäker.

Det ena är att hela strukturen i esperantorörelsen bör omarbetas, och jag

har länge ansett att SEF skulle ta ledningen i detta arbete. I ett annat årsmöte än SEF:s, nämligen institutets, togs i Lesjöfors i maj stora och lovande framsteg i strukturdiskussionen, så jag lämnar här den frågan.

Vad gäller Esperantoförbundet så har jag efter hand blivit övertygad om att vi, med den brist på styrka som vi nu har, bör samla alla krafter i ett övergripande agerande som kan sammanfattas i ordet kommunikation.

Kommunikationen måste bli bättre dels mellan SEF och medlemmarna och esperantister i allmänhet, dels mellan SEF och massmedierna och samhället omkring oss. Och den kommunikationen måste vara planerad och sammanhållen.

Jag har arbetat för beslut om att få till en plan, en strategi kallade jag det, att diskutera vid kongressen. Jag ville det inför kongressen i Borlänge 2009 liksom inför Lesjöfors 2010. Men tiden har inte varit mogen att ta detta steg.

La Espero

Det är väl tio år sedan jag började diskutera Espero med Franko Luin, som då var både redaktör och ordförande i SEF.

SEF har en potentiell stor tillgång i Espero, som Franko givit en unikt bra form. Men innehållet skulle kunna förändras. Från att nu vara ett medlemsorgan för 400 medlemmar till att vara en tidskrift för språk och språkpolitik.

Den som tvivlar på att det finns intresse för en sådan

facktidsskrift kan bara se vad som senare dykt upp på marknaden, och gjort succé, nämligen Språktidningen. Vi skulle kunna göra ett modernt mellanting mellan Norda Prismo och Språktidningen. Tvåspråkig, sven-ska och esperanto. Spridd främst i Sverige, Norge, Åland och Finland, och därmed kanske få kulturstöd också från EU.

Översätter man titeln "La Espero" blir det ju "Hoppet". Men det namnet går inte att använda, tror jag. I min egen föreställningsvärld heter idén sen någon tid "Hoppsan".

Om Lyckad nedfrysning av herr Moro kunde göra succé som boktitel, varför skulle Hoppsan inte bli en framgångsrik tidskrift?

Espero (Hoppsan) skulle kunna bli stommen i en genomtänkt kommunikation.

SEF:s nuvarande verksamhet består också nu till stor del av kommunikation.

Men mycket baseras på individer, som brinner för eller bara föreslår något.

Detta "något" kommer upp på SEF-styrelsens dagordning och ventileras. Om inga tungt vägande skäl talar emot så kan pengar anslås. Utan att delen eller delarna ingår i någon sammanhängande plan.

Men vi behöver en samordnad strategi, en sammanhängande plan.

Bengt Nordlöf



SVEDA
ESPERANTO
INSTITUTO

La prokrastita jarkunveno de Sveda Esperanto-Instituto estas daŭrigota dum la renkontiĝo en Norrköping. La Estraro de Sveda Esperanto-Instituto

54-jaraĝa inĝeniero serĉas esperantistojn-filatelistojn por reciproka interŝanĝo per poŝtmarkoj. Se iu interesiĝas per poŝtmarkoj, emisiitajn de eksa Sovet-Unio aŭ nuntempaj Ukrainio, Rusio kaj kelkaj aliaj landoj, kiuj aperis post disfalo de eksa Sovet-Unio, tiu bv. skribi al: Vjaĉeslav Vasiljev Osipenko 10-2 LUGANSK, UA-91005 Ukrainio anelav@ua.fm

Someraj kursoj: Kluba program' en Stokholmo

Deko da partoprenantoj estis en Lesjöfors, kaj simila nombro estis en Visingsö dum la someraj kursoj pri esperanto en Svedio ĉi-jare.

La kurso en Esperanto-domo en Lesjöfors, 13-21 julio, havis miksitan programon, kiu adaptiĝis al la niveloj de la individuaj partoprenantoj, el kiuj du venis el Norvegio. Carl Mäsak el Uppsala instruis uzante la lernolibron "Grodan" al komencantoj, kaj je aliaj horoj mem partoprenis kurson pri esperantologio, kiun Roland Lindblom gvidis. Post la lecionoj de la dimanĉo, la grupo faris ekskurson al muzeaj memoraĵoj pri ferfandejo kaj seĝejo ĉe akvofalo.

La kurso en insulo Visingsö estis aranĝita de la popol-altlernejo en kunlaboro kun la Sveda Esperanto-Instituto, 26-30 julio. Je tiu ĉi kurso duono el la partoprenantoj venis el Danlando. Oni laboris je tri grupoj, kun instruantoj Lars Forsman, Inga Johansson kaj Folke Wedlin. Partoprenantoj el aliaj samtempaj kursoj de la popolaltlernejo estis invititaj al prelego. Ekskurso okazis al la historiaj memoraĵoj en alia parto de la insulo.

Ulla Luin



*Partoprenantoj de la somera kurso en Lesjöfors 2010.
Fotis: Marianne Andersson*



*Aŭskultantoj de prelego aranĝita en kunligo kun somera kurso en Visingsö 2010.
Fotis: Helena Andersson*

EKSpreso, la revueto de la Stokholma klubo prezentas la programon de la Stokholma klubo. Jen kelkaj ekzemploj:

Kongresaj memoroj – UK en Havano, Tomas Jansson kaj Sven Linnér; Esperanto por komencantoj; Ni kantas kun Gunilla Almér; Marko Giovanoni el Florenco, Italio Diskuto pri ideoj antaŭ la seminario en Norrköping; Paŭla Grossman rakontas pri jidaj lingvo kaj kulturo; Studvespero; Planado pri la Sveda Esperanto-kongreso en majo 2011; Pri Rusa Esperanto-Kongreso) en Sankt-Petersburgo raportas Ingvar och Soile.

Kongreso 2011 en Stockholm

Sveda Esperanto-kongreso okazos en Stockholm venontjare, laŭ invito kiun la Esperantoklubo de Stockholm transdonis al la partoprenantoj dum la jarkongreso en Lesjöfors. Informo pri dato venos pli poste, diskutataj estas semajnfinoj meze de majo.

Tävling i digitalt berättande

Årets upplaga av Europeiska språkdagen, arrangerad av Internationella programkontoret, har till skillnad från tidigare år formen av en tävling i digitalt berättande. Esperantoförbundet är även i år med som en av de medverkande organisationerna. Tävligen lanseras på webbsajten www.thelanguagesinmylife.se den 26 september och löper fram till 31 oktober. Tävligen är öppen för ungdomar upp till 19 år och går ut på att med valfri teknik – till exempel stillbilder och berättarröst, eller mobiltelefon med videokamerafunktion –

skapar en högst 60 sekunder lång film på temat språken i mitt liv.

Costa el Tanzania vizitis nin

Dum kelkaj tagoj Costantine Mashauri el Tanzanio vizitis Svedion. Costa estas konata de svedaj esperantistoj pro siaj du antaŭaj vizitoj, laste en 1999. Li nun partoprenis bibliotekan konferencon en Gotenburgo kaj restis kelkajn tagojn por renkonti malnovajn amikojn. En Karlstad dum tago li renkontis i. a. Lennart Svensson, kiun li helpis dum du semajnoj en Esperanto-Gården dum la vizito 1999. La tagon poste la klubo en Göteborg kunvenis en la bela Botanika Ĝardeno kaj miksita kun estrarkunveno estis vigla diskuto pri la esperantomovado kaj la eblecoj disvastigi Esperanton. Costa rakontis, ke oni ne sukcesis vivteni Tanzania Esperanto-Asocion, sed ke pluraj kluboj daŭre vivas kaj ke la kontaktoj inter ili kaj antaŭaj rifuĝintoj en la Kigwakampadejo, nun ree en sia hejmlando Kongo, ne ĉesis. Costa jen kaj jen ricevas demandojn pri Esperanto kaj la lerneblecojn de tanzaniaj kaj kenjaj interesitoj.

Post ekskurso en la suda arkipelago, kiun li tre ĝius, vizitoj en magazenoj kaj butikoj, li reveturis Afriken frumatene la kvinan tagon.

Anita Dagmarsdotter

Komputila donaco

La Esperanto-klubo de Stokholmo dum la Universala Kongreso en Havano transdonis donacon al la klubo en Granma en Kubo. Temis pri unu nova portebla komputilo kaj ankaŭ pri kelkaj partoj por malnova komputilo el 1988-1989.

Sven Linnér

Skoltoj revigliĝas

Skolta Esperanto Ligo, preparas novan strategian agadplanon por memorigi sian 100-jarigon en 2018. La ligo de Esperanto parolantaj geskoltoj planas revigliĝi ĝian agadon kaj oferi novan programproponon por la skolta movado per la popularigado de diverseco uzante la internacian lingvon.

SEL, la plej malnova internacia skolta organizo planas agi en la kampoj de informado (pri Esperanto en naciaj skoltmedioj ĉi jare), trejnado (trejnseminarioj por novaj aktivuloj en 2011) kaj aplikado (internacia skolta tendaro en 2012). SEL bezonas geesperantistojn, iamajn au nunajn geskoltojn, kiuj volus kunlabori loke kun naciaj skoltasocioj aŭ internacie ene de SEL. Se Vi volas scii pli, bonvolu viziti: esperanto.org/skolta



Sciencaj aranĝoj - KAEST

KAEST - "Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", dum lastaj 10 jaroj okazadis apud Prago, danke al la sindediĉo de Petro Chrdle kaj ĉeĥaj E-istoj. Ĉi-jare la aranĝon kaj ĝian organizadon transprenis E@I (helpe de slovakaj E-istoj) kaj kun tio venas kelkaj ŝanĝoj rilataj:

KAEST 2010 okazos en Slovakio (proksime de la ĉefurbo) 18-21 novembro. Detalojn pri la aranĝo vi povas trovi nun ĉe: <http://www.ikso.net/kaest/>

Heidi refoje en Indonezio

Post la sukceso de kursoj en Indonezio, Heidi Goes planas plian instruvojaĝon septembre-oktobre ĉi-jare (denove ĉ. tri semajnoj). Ŝi planas reiri al kiel eble plej multe el la samaj urboj, kaj eventuale aldoni unu-du aliajn urbojn, kie nun junaj homoj mem eklernis post sciigo pri la lingvo pere de la grupo en Facebook.

Ĝus aperis intervjufilmo, en kiu Katalin Kováts, kiu flanke de edukado.net helpis prepari la metodikan parton de la instruvojaĝo, parolas kun mi pri miaj preparlaboro, spertoj kaj rezultoj. La filmo donas utilajn ideojn pri tiutipa laboro por vojaĝantaj instruistoj kaj enrigardon pri la movada vivo en Indonezio.

La filmo estas ankaŭ aĉetebla kontraŭ 20 eŭrojn, sumo per kiu oni subtenas la novan instruvojaĝon (lernomaterialojn, ekzamenkotizojn...) La subtenmono sendeblas al UEA-konto hego-v kun klara mencio de la celo: 'Heidi en Indonezio' aŭ la DVD-oj pageblas ĉe transpreno ĉe iu el la E-aranĝoj kie ili aĉeteblas.

Ankaŭ eblas subteni la vojaĝon ĝirante vian kontribuon al la Fondaĵo Azio de UEA, same kun mencio 'Heidi en Indonezio'. Tiam vi ne ricevos la filmon, sed povas subteni ankaŭ per pli malgranda sumo.

Heidi Goes
heidi.goes@gmail.com

PS: Korekto pri la artikolo en LE 3: Heidi Goes devenas el Flandrio, la nederlandlingva parto de Belgio, sed ne el Nederlando. La ĉefurbo de Indonezio nomiĝas Ĝakarto (EO) aŭ Jakarta (ID).

Nova honora patrono

S-ro Ulrich Brandenburg, la germana ambasadoro en Moskvo, estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Ulrich Brandenburg naskiĝis en 1950. Li estas denaska espe-

rantisto. En aŭgusto 2007 li fariĝis konstanta reprezentanto de Germanio ĉe NATO en Bruselo. Poste, pro sia sperto pri la slava mondo kaj pri Rusio, li estis nomumita kiel ambasadoro en Moskvo, kie li deĵoras ekde aprilo 2010.

Post studado de lingvoj en Múnster kaj Parizo Brandenburg unue laboris kiel instruisto. En 1980 li komencis sian karieron en la diplomatia servo de Germanio. Li deĵoris unue en la ambasado en Bagdado 1982-1984 kaj daŭrigis ĉe la ĝenerala konsulejo en Leningrado (Sankt-Peterburgo) de 1984-1986 kaj ĉe la ambasado en Moskvo 1986-1988. Ĝis 1995 li deĵoris en la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj. De 1995 ĝis 1999 li gvidis sekcion ĉe la admistracio de NATO en Bruselo. Reveninte al la Ministerio en 1999 li laboris i.a. kiel komisiito pri Rusio, Kaŭkazio kaj Centra Azio kaj kiel vicestro de la Politika Departemento, ĝis sia unua nomumo kiel ambasadoro.

Dum pluraj jaroj Brandenburg aktivis en Germana Esperanto-Junularo. En 1974 li havis la ĉefan respondecon pri la organizado de la TEJO-kongreso en Múnster. Vicprezidanto de TEJO li estis 1973-1975.

Cigno subvencias

Subvencio Cigno de UEA, financata de la japana industriisto Miyoshi Etsuo, estas donata ĉiujare por subteni seriozan Esperanto-agadon en la Tria Mondo aŭ la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo. Ĝia valoro estas 500 000 japanaj enoj, t.e. preskaŭ 4400 eŭroj. Pri la subvencia sumo decidas la Estraro de UEA, kiu anoncas sian decidon en la ferma solenaĵo de la Universala Kongreso de Esperanto.

Ĉi-jare la subvencio estis egale dividita inter du ricevantoj. Esperanto-Asocio de Bosnio kaj Hercegovino ricevas subvencion por la renovigo de sia sidejokunvenejo kaj la Komisiono por Meza Oriento kaj Norda Afriko por informado pri Esperanto en arablingvaj landoj, unuavice en Libano kaj Egiptio.

ANONCETOJ

Bonvolu sendi al ni florsemojn por ornamo "Florbedo de l'Espero"

Antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj, mi estis medicina studento kaj esperis ornamo ĝardenon de nia fakultato per floroj. Mi sendis leterojn al diversaj landaj esperantaj oficejoj. Multajn leterojn kaj semojn ricevinte (241 leterojn kaj 332 semsaketojn el 27 landoj en 1957-2006),

Mi kaj medicinaj studentoj ĉiujare semis kaj semis tiujn. Ili kreskis kaj floris tre bele, kaj montris la spiriton de sendintoj al niaj medicinaj studentoj. Dankinde ni respondis kaj sendis fotojn de floroj al la sendintoj ĉiujare. Sed iom post iom la semoj perdiĝis, kiel la daŭra poemo de nia kara Majstro, kaj nun restas nur du specioj. ("Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas. Ni semas kaj semas konstante."

D-ro L L Zamenhof)
Ni denove esperas ornamo la fakultaton per via afabla spirito. Se nia entrepreno interesas vin, bonvolu sendi semojn al mia postvenantino: D-rino Reiko FURUMOTO, La Unua Biokemio, Medicina Fakultato, Yamaguci Universitato, UBE, Yamaguci-ken, Japanio.

LINGVO

Språkråds- dagen

För tredje året i rad höll Språkrådet och Institutet för språk och folkminnen sin konferens Språkrådsdagen den 6 maj i Folkets Hus på Barnhusgatan i Stockholm. Ingrid Johansson Lind, generaldirektör för institutet, berättade i sitt inledningsanförande att intresset för språkvård växer, och att uppföljning av språklagen som trädde i kraft 1 juli 2009 är ett av institutets och Språkrådets ansvarsområden.

Språkrådets chef Lena Ekberg talade om att risken för domänförluster i svenskan, att t.ex. svenska fackuttryck inom vissa områden inte utvecklas eller används i tillräcklig utsträckning, fortfarande är en aktuell fråga. Hon menade dock att den inte är lika kritisk som de svenska minoritetsspråkens ställning, som hotas av både svenska och engelska. I och med att Sverige beslutade att följa Europarådets minoritetsspråkskonvention är sedan 1 april 2000 finska, tornedals-finska, samiska, romani och jiddisch officiella minoritetsspråk i Sverige. De tre första har dessutom en något starkare position genom att de är knutna till regioner, förvaltningsområden, där enskilda människor har rätt att vända sig till- och bli bemötta på språket i sin kontakt med myndigheter.

Även Kenneth Hyltenstam, professor vid Centrum för tvåspråkighetsforskning vid Stockholms universitet talade huvudsakligen om svensk språkpolitik och språklig mångfald, och tog också upp minoritetsspråkskonventionen i sitt föredrag. Migration, internationalisering och globalisering har bidragit till ökad flerspråkighet, men gör det också svårare för små språk och minoritets-språk att bevaras och utvecklas, trots lagstadgade rättigheter att använda språket. Han underströk dock att vi aldrig kommer

komma ifrån att olika språk behövs i olika syften.

Linus Salö, språkvårdare vid Språkrådet, presenterade resultatet av sin undersökning av användningen av svenska och engelska på universitetet. Även här berördes riskerna för domänförlust, men han påtalade också att språken i sig inte hotar varandra, utan beslut om användningen av dem.

Rickard Domeij, också språkvårdare vid Språkrådet, talade om och visade exempel på tillgänglighet på webben, framförallt ur ett flerspråkighetsperspektiv. Det råder stora skillnader i kvaliteten på översättningar, mängden och vilken typ av information som finns tillgänglig på olika språk från kommuner och offentlig förvaltning: en del använder till och med Googles översättningstjänst för att "tillhandahålla" information på andra språk. I ett försök att förbättra situationen har Språkrådet sammanställt vägledningar för tillgänglighet och flerspråkig information på sin hemsida.

I slutet av konferensen delades Erik Wellanders pris för forskning inom språkvårdens område ut. Årets pris gick till professor Inger Lindberg vid Stockholms universitet för hennes arbete inom tvåspråkighetsforskning. I sitt tacktal beklagade hon brister i utbildningen i svenska för invandrare och svenska som andraspråk, men menade också att framtidens lärarutbildning förhoppningsvis kommer vara mer anpassad för fler- och mångspråkighet.

Olof Pettersson



NEKROLOGO

Göte Lingshede (1916-2010)

Forpasis fervora esperantisto. La dekan de junio ĉi-jare forpasis Göte Lingshede, membro de la Stokholma esperantoklubo. Li naskiĝis en la jaro 1916 en Mattila, vilaĝo apud Haparanda en la Torne-valo. Li estis la okenaskita infano inter naŭ gefratoj. Lia patro estis kamparano kaj flosigadestro (*flootningsförmän*).

Kiam Göte estis kvinjaraĝa, li estis frapita de la malsano meningito, per kiu li preskaŭ totale perdis sian vidpovon. Komencante la lernejon li tial devis fari la longan vojaĝon al la blindulinstituto de Tomteboda en Solna. Poste li frekventis la porblindulan metilernejon en Kristinehamn, kie li lernis broŝfaradon. Li fariĝis lerta metiisto kaj etabliĝis en Haparanda kiel broŝfaristo. Tie li kreis metiejon, dungis nevidantajn laboristojn kaj prizorgis la vendadon de la produktaĵoj.

En la komenco de la 1950-aj jaroj la tiama sveda blindulasocio "De Blindas Förening" dungis lin kiel metiista konsilanto, kaj li translokiĝis al Stokholmo.

En la ĉefurbo li trovis sian edzinon Vera, kaj ili ricevis du infanojn.

Göte venis en kontakto kun esperanto jam en la blindulinstituto, kie oni komencis instrui esperanton jam en la fino de la 1920-aj jaroj. Li havis multajn korespondamikojn en la mondo, kaj li faris multon por antaŭenigi esperanton inter la svedaj nevidantoj. Li organizis kursojn kaj internaciajn renkontiĝojn. Li ankaŭ kunhelpis fondi muzeon de nevidantoj, *Synskadades museum*, kiu nun ankaŭ enhavas internacian esperantan Brajloarhivon.

Mats Landfors

ANONCETOJ

Mi estas kuba esperantisto kiu apartenas al Granma Esperanto-filio, en urbo Bayamo, kie estas 32 membroj. Bayamo estas la ĉefurbo de la provinco "Granma", kie estas nia malgranda sidejo en la supra parto de la Kulturdomo antaŭ la Revolucia placo.

Mi serĉas amikojn aŭ amikinojn en via lando, kun kiuj ni povos fari kontaktojn por la amikeco, ĉar ni bezonas informi al niaj samideanoj pri la esperanta situacio en la mondo, por la evoluo de la movado.


Ankaŭ ni bezonas bonajn eksterlandajn rilatojn, por ke niaj geamikoj vizitu nian urbon.

Se al vi plaĉas kaj vi akceptas mian proponon, bonvolu, respondi min.

Kun noblaj salutoj,

Rafael Cabrera
Espinosa.
Prezidanto
Kuba Esperanto-
Asocio, filio de
Granma,
c.p. 48
Bayamo 1, 85100
Granma
Kubo

VIZAĜOJ Novelaro 2000-2009



Ĝi ĵus aperis!

Sten Johansson: La Esperanta novelarto dum 120 jaroj
Massimo Acciai: La urbo
Ulrich Becker: La inico
Mikaelo Bronŝtejn: Peco de kablo
Jorge Camacho: Sep rakontetoj
Luiza Carol: Ĉu vi scipovas ludi tomlandilon?
Leen Deij: Tenu la amon brulanta!
Vimala Devi: Dubo
István Ertl: Ducent mejloj ĝis Talooska
Ruben Feldman Gonzalez: Rememoroj pri dolĉa patrino
Judit Felszeghy: Iam, ne dimanĉe
Lina Gabrielli: La unua de aprilo
Gbeglo Koffi: Rampo-lernejo
Paul Gubbins: Cirkvita perturbo
Sten Johansson: Pordo al la maro
Lena Karpunina: Ordinara vizaĝo
Miĥail Korotkov: Io devas okazi
Mao Zifu: Unu monato
Geraldo Mattos: Vivogumo
István Nemere: Du mikronoveloj
Leif Nordenstorm: Signoj dum ŝtormo
Raita Pyhälä: Post unu vivo kune
Christian Rivière: Go-ludo
Sen Rodin: La ŝtelo-manao
Giorgio Silfer: La violeta zontuko
Trevor Steele: Feliĉan Kristnaskon
Lenke Szász: Nekrologo
Paulo Sérgio Viana: Geedza ringo
Tim Westover: Rulkreskaĵo
Etel Zavadlav: Ŝtelisto Hadit kaj lia frato
Biografietoj

29 noveloj
179 paĝoj
200 svedaj kronoj
plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto
Esperantoförlaget
Retadreso: eldona@telia.com
Telefon: 070-5850054

RAKONTETOJ

Sveda vilaĝo en Usono

Bishop Hill estas vilaĝo en la Usono, en la ŝtato Ilinojso. Ĝi koloniigis per Svedaj enmigrintoj en la 1850aj. Ĝi estis religia komunumo fondita per Eriko Jansson. Ĝi estis komunumo simila al la tremantoj (*shakers*) kaj la amiŝo.

En la kolonio, la viroj kaj la virinoj laboris en la kampojn. Bishop Hill faris ŝarĝventurilojn por la tremantoj.

Hodiaŭ, Bishop Hill estas vilaĝo dediĉita al Sveda kulturo. Tie estas butikoj kaj historiaj konstruaĵoj. Tie estas la Pinturo Konstruaĵo (*Steeple Building*), la Kolonia Preĝejo (*Colony Chur-ch*), kaj la Kolonia Lernejo.

En junio, Bishop Hill festas somer-mezon kaj en septembro agrikulturajn tagojn. En decembro estas Kristnaska Bazaro. La bazaro inkluzivas la Lucian Knabinon kiu servas zingibrajn kuketojn.

Pentrismo Olof Krans

En Bishop Hill estas muzeo kiu havas pentraĵojn de Olaf Krans. Lia pentradoj bildigis la vivon en la kolonio. La kolonio disiĝis en 1860.

Multe de la historio de Bishop Hill estas bildigita en la pentraĵoj de Olof Krans. Lia pentraĵo eksponas la kolonistojn kaj iliajn vivojn.

Krans naskiĝis en norda Uppland. Li venis al la Usono en 1850 kaj ekloĝis en Bishop Hill. Li servis en la Unuiĝo Armeo dum la Amerika Interna Milito.

Post la milito, li estis domopentristo kaj interno dekoristo en Galva, Ilinojso. Li farbis



Rikoltado
De Olof Krans

konstruaĵoj, komercajn signojn, kaj fonojn por la loka opero.

Post la fino, li komencis pentri bildoj de Bishop Hill. Ili estis de la instruisto, la maro kapitano, kaj la unua infano naskita en la kolonio. Tie estis pentraĵo de kolonisto batalanto kun indiano. Tio estas pentraĵo de la koloniistoj, draŝanto en la kampo kaj unu de la virinoj semanta grenojn.

Krans mortis en 1916. Liaj pentradoj estis en la Kolonia Preĝejo, sed translokiĝis al nova konstruaĵo. La ŝtato de Ilinojso konstruis la Olof Krans Muzeon. Ĝi estis dediĉita en 1988. Lia pentradoj estas ankaŭ al la Tarnjō Muzeo en Svedujo kaj al la Chikago Arto Muzeo.

Agrikulturaj tagoj

Ĉiun septembron, Bishop Hill, sveda vilaĝo en la Usono, en la ŝtato de Illinois, festas agrikulturajn tagojn (*Jordbruksdagarna*).

Tie estas demonstracioj de antikva agrikultura ekipaĵo, por plantado kaj por rikoltado. Tie estas demonstracioj de plugisto kaj ĉevalo kiu tiras la plugilon.

En la antikva Kolonia Lernejo, la virino faras panon, sapon, kaj pupojn de maizoj.

En la parko, muzikistoj ludas popolan muzikon. Tie estas ankaŭ popola dancanto. Dancistoj portas tradiciajn svedajn kostumojn.

Agrikultura Tagoj estas granda evento en Bishop Hill. Aliaj eventoj estas somermezo en junio kaj kristnaska bazaro en decembro. Ĉe kristnaska bazaro, infanoj portretas elfojn. En la butikoj, tie estas knabinoj ke portretas la "Lucia." Ŝi portas blankan robon, ruĝan skarpon, kaj kronon kun kandeloj. Ŝi donas kuketojn al la vizitantojn.

Bishop Hill havas multajn festavalojn. Ili estas peco de Svedujo en la Usono.

Joelo Bjorling
Sveddevena usona
esperantisto